

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 8.2.2012

Rememoro pri mia renkontiĝo kun Tibor Sekejl

Josef Vojáček

Mi partoprenis en Hungario en Gödöllő (antaŭurbo de Budapeŝto) ILEI konferencon en la jaro 1978 aŭ en 1979 (mi ne memoras precize la jaron). Por mi ĝi estis (krom pedagogia programo) tre interesa. Mi loĝis en dulita ĉambro kun profesoro Szerdahely, kiun mi povis pli bone ekkoni persone, li estis tre agrabla homo. La alia eminentulo, kiu partoprenis la konferencon, estis Tibor Sekejl. Unu vesperon rekontiĝis en lia ĉambro grupeto de konferencanoj por babilado kun li kaj mi havis la feliĉon esti en ĉi tiu grupo.

Lia rakontado estis tre interesa, kion certe povas imagi ĉiu, kiu legis iu(j)n el liaj libroj. Kiam li vidis la situacion en Eŭropo antaŭ proksimiĝanta la dua mondmilito, li kolektis kelkajn geamikojn, preparis ekspedicion kaj forveturis el Eŭropo, sed mi ne memoras, pri kiu ekspedicio temis kiel la unua. La plej interesa estis lia rakontado pri lia restado inter indiĝenaj triboj en Brazilo kaj Nova Guineo. Por la esploroj li neniam venis kun ekspedicianoj kiel fremdulo, li vivis inter indiĝenoj kiel ano de ilia tribo. Li lernis iliajn lingvon, submetiĝis al iliaj kutimoj kaj partoprenis ĉiujn ritualojn kaj laboris por vivteni sin kune kun vilaĝanoj. Tiamaniere li povis detale esplori iliajn vivon kaj vivmanierojn.

Kelkfoje li estis en danĝero de vivo. Iam okazis, ke al ŝamano de la tribo tre plaĉis edzino de Tibor. Sed la geedzoj estis ĉiam kune, do Tibor estis grava malhelpilo por ke li povu akiri lian edzinon kaj li strebis iamaniere forigi lin. Iam nokte falis palmo sur kabanon, en kiu Tibor dormis. Feliĉe li kuŝis sub apogilo, firma trabo kaj la falinta palmo lin ne mortigis, eĉ ne vundis. Kiam li poste esploris la palmon, li klare vidis, ke la trunko estis intence dounsegita. Iam ŝamano invitis lin en sian kabanon kaj regalis lin per tre bongusta trinkaĵo. Estus malĝentile rifuzi inviton aŭ trinkaĵon, ĉar tio estis granda honoro por li. Kiam Tibor eliris el la kabano, li pripensis, ke en la trinkaĵo verŝajne estis veneno. Li iris a ilia kuracisto kaj diris tion al li. Kuracisto donis al Tibor kontraŭvenenan injekton kaj medikamenton por vomi, por ke amenaŭ kiel eble malmulte da veneno restu en lia korpo. Sed tamen iom de veneno restis kaj komencis efiki. Tibor senkonsciiĝis kaj aspektis preskaŭ morta. La sekvan tagon lia korpo tamen venkis la krizon kaj li vekiĝis. Meze de la kabano estis elfosita truo por entombigi lin. Ĉe tiu tribo estis kutimo entombigi mortinton en la kabano, en kiu li vivis. Estis do klare, ke oni jam konsideras lin morta. Li mobilizis siajn fortojn kaj pene iris ĝis la palmo meze de vilaĝo kaj tie falis. Iom pos iom li resaniĝis, kio estis granda surprizo por ŝamano. Ĝis tiam neniu transvivis regalon per lia venena trinkaĵo. Ununura klarigo de tio estis, ke Tibor estas Dio. De tiam li povis havi ĉion, pri kio li

nur pripensis kaj povis havi komfortan vivon. Sed li rezignis kaj daŭrigis sian vojaĝon al alia tribo.